# KVINPETALO (SYM)

## *NOVAĴLETERO*

Februaro 2025



## Pasinteco kaj estonteco

Esperanto havas jam longan historion. Esperanto havas estontecon, kiun espereble portas nova generacio. Tiu historio, tiu kulturo postulas de ni strebon por konservi kaj konigi ilin en kaj ankaŭ ekster la movado. Kvinpetalo volas roli en tiu servo. Nia memoro ne povas, ne devas perei.
Kvinpetalo havas bibliotekon kun dokumentoj kiuj portas la homan sperton de tiu homama aventuro. Kvinpetalo ricevis ankaŭ arkivojn, kiujn oni devas listigi, konservi kaj diskonigi.
Antaŭe Kvinpetalo vivis dank'al la staĝoj. Tio bedaŭrinde ne plu validas. Nun la sola ebleco estas vivi el donacoj.
Por **sekurigi la pluvivon** de la centro, **ni bezonas regulajn donacantojn**. Kelkaj manifestiĝis, sed **la nombro tute ne sufiĉas**. Kalkuli kun fortaj donacoj de nur kelkaj ne estas saĝe. Vi povas esti parto de tiu kultura batalo per donaco, per partopreno en staĝo kaj ankaŭ per informado al aliaj, esperantistoj aŭ ne-esperantistoj.


## Biblioteko

Nia biblioteko ne estas la plej granda en la mondo, certe ne. Ĝi ĉefe formiĝis el donacoj, kaj tiel estas ĝi riĉa, ĉar multaj el tiuj libroj estas prinotitaj kaj/aŭ dediĉitaj. Ni ankaŭ provas, kiam ni ricevas, akiras aliaj dokumentojn, serĉi eldonojn malsamajn. Tiuj libroj estas je dispono de esploristoj kaj studentoj por surloka uzo (neniu pruntedono).

## Arkivoj

Ordigenda kaj katalogenda estas la arkivo, de SYM, sed ankaŭ de Gaston Waringhien kaj Roger Bernard, kaj krome kelkaj objektoj. Tio estas la nuna ĉefcelo. Sen tiu katalogado, la arkivaj dokumentoj estas tute senutilaj kaj neuzeblaj.

## Staĝoj



La baldaŭa staĝo estas planata en marto (2-7/03/2025) :
**Promeno tra la lingvo kaj la regiono**.
Por komencintoj kaj progresintoj ni proponas hibridan semajnon, samtempe lingvolernan kaj turisman: venu por partopreni diversajn ekzercojn por plibonigi viaj[...]sojn al kelkaj vidind[...] lingvan etoson de Kvi[...]
**Brian Moon**, [...] pri kelkaj misaj uzoj de la lingvo, esprimoj kaj vortoj. Vi samtempe [...]n kaj korektos viajn eblajn misojn. **Esperanto estas vivanta lingvo** kiun oni nepre flegu, kaj samtempe evoluigu.

Tiu ĉi staĝo estas prokrastita pro partopreno de la gvidanto en la funebra ceremonio de Renato Corsetti.

En aprilo estas planata staĝo (7-11/4/2025): **promeno tra la biblioteko**, kondukota per Philippe Cousson.

En majo, **Bernard Lagrange** gvidos la staĝantojn por **aranĝi la ĝardenon**.
Inter niaj domoj kuŝas ĝardeno kiun oni planas aranĝi por favori la biodiversecon. Kvinpetalo membriĝis al LPO asocio por protekti kaj gastigi la birdojn. Ofte pro indiferenteco aŭ nekono ni seniĝas je la plezuro kontakti la aliajn vivantaĵojn. Admiri, kontempli, observi estas la unuaj paŝoj al respekto kaj pli bona kono.
Lastjare Kvinpetalo aĉetis apudan ĝardeneton kun ruiniĝanta dometo. Estus bone utiligi tiujn disponeblajn ŝtonojn por akcepti la pluvakvon el niaj tegmentoj. En majo (?) staĝo pri ĝardenumado celos per kunlaborado pretigi la ĝardenpn kaj la loĝejon de akvaj bestetoj (libeloj, ranoj kaj eble eĉ tritoj...)

## Kluboj

Kvinpetalo estas sufiĉe **proksima de pluraj lokaj kluboj** por fariĝi renkontejo. Ni lanĉis unuan inviton al kiu respondis esperantistoj de la departemento Deux-Sèvres. Certe estas malfacile trovi daton por tiaj interklubaj renkontiĝoj, principe dum sabato (kun ebleco tranokti). Por denove inviti, ni bezonas havi ideon pri kiu sabato en la baldaŭaj monatoj konvenos al vi. Estas ankaŭ ebleco uzi la centron **por semajnfina "seminario" de via klubo**.
**Nepre, kontaktu nin por kunorganizi tiajn eventojn.**

## Donacoj

Post la unua alvoko, ni ricevis kelkajn donacojn. **Koran dankon al la jam donacintoj.** Esceptaj donacoj permesas al ni vivi, sed tio devas resti esceptoj. **Ni bezonas regulajn donacojn** ĉar la staĝoj ne sufiĉas por vivteni nin. Kiel ni jam diris 100 donacoj de 120 € devus sufiĉi por travivi unu jaron. Pli permesus plibonigi la domojn kaj la kolektojn. **Ni ne lasu la esperon fali.**
**Se ni ne trovas sufiĉajn donacantojn, ni devos ĉesigi la agadon.**

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse. **http://kvinpetalo.org**
Ĉekoj al **Société Yvonne Martinot**
Ĝiro al Société Yvonne Martinot, **IBAN** : FR91 2004 1010 0602 4086 2H02 795, BIC : PSSTFRPPLIM
Ĝiro ĉe UEA al **konto *syma-l*** kun indiko "Donaco de ...".
Sendu paralele retmesaĝon al kasisto.kvinpetalo@sfr.fr.

---

*Respondilo por kopii kaj sendi poŝte (aŭ rete al* kasisto.kvinpetalo@sfr.fr*)*

Nomo :
Retadreso :

[] Mi estas preta donaci **jare** 50€ / 120€ / 250€ / 500€ / 1000€ / ..............€.
[] Mi ĵus sendis .................€ al via konto la (daton)............................. 2025 ([] ĝiro, [] ĉeko, [] UEA)

[] Mi ne povas helpi per donaco sed mi proponas alian subtenon
(bv klarigi) : ..................................................................

[] Mi ne povas helpi la asocion sed mi deziras daŭre ricevi novaĵleteron.
[] Mi deziras ne plu ricevi informojn : bonvolu eltiri mian adreson el via listo.
[] Mi havas librojn, dokumentojn, objektojn, kiujn mi volonte lasus al Kvinpetalo.
[] Mi sugestas, ekzemple pri la staĝoj : ......................................................